# *Eksterordinara pintkunsido de ALBA en Panamo.*




La prezidentoj de la landoj kiuj membras la Bolivaran Aliancon  por la Amerikaj Popoloj (ALBA) kunsidos ?i-sabate en eksterordinara sesio en kiu Venezuelo invitos formale al Panamo ali?i al  la  integriga mekanismo  Petrocaribe.

La prezidento de Venezuelo, Nicolás Maduro, anoncis ke la kunsido ekfetivi?os  frue en la mateno kaj lia lando proponos al la prezidentoj kaj ?efministroj de tiu ?i organo, etendi siajn solidarajn brakojn al la sektoroj plej malri?aj de Panamo, informis Telesur.

“Petrocaribe estas realo, ne estas trompo. ?i estas projekto por liberigi la popolojn”, esprimis Maduro, kiu deziras ke Panamo anka? ?uu iniciatojn sociajn kiel la Misio Miraklo (helpo al personoj kun vidproblemoj) kaj la Misio Barrio  Adentro (sanservoj) al la kvartalo El Choriillo, en la ?efurbo de Panamo.

La? esprimis la bolivia prezidento Evo Morales, la prezidentoj de ALBA decidos kune rilate al la ekzekutiva dekreto de la usona prezidento Barack Obama kiu konsideras Venezuelon kiel minaco por la sekureco de tiu nordamerika lando.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/internacionales/52324-eksterordinara-pintkunsido-de-alba-en-panamo

# Radio Habana Cuba